

# LINGVO INTERNACIA

MONATA GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

ELDONATA DE LA KLUBO ESPERANTISTA EN UPSALA.

|   |                                      |
|---|--------------------------------------|
| Kosto de abono por jaro:                    | Pago por anoncoj:                    |
| kronoj 3,00 = germ. markoj 3,30 = cendoj 75 | 15 öre = 15 pfenigoj = 20 centimoj = |
| = frankoj 4,25 = rejsoj 1000 = rubloj 1,50. | 8 kopekoj — por duonpaĝa petitlinio. |

Adreso de la redakcio: *Klubo Esperantista, Upsala, Sverige.* (Svedujo.)

III: a jaro.

Oktobro 1898.

N: o 10 (34).

## Tri proponoj.

Mi kuraĝas altiri la atenton de estimataj kunideanoj al plenumo de tri projektoj el tri tute diversaj sferoj de nia afero. En Rusujo oni diras: "per bonaj projektoj estas pavita infero" kaj efektive: — kiel-ajn bona estus projekto, — ĝi estas preskaŭ nenio, se ĝi ne estos plenumita.

Elirante el tiu ĉi konkludo mi nun prezentas al esperantistoj nur plenumeblajn kaj plenumotajn projektojn, el kiuj unu estas jam efektivigita kaj atendas nur disvastigadon, la dua estas duone plenumita kaj la tria estas komencita.

### I.

En la Februara N: o de "L. I." 1896 jaro la estimata franca esperantisto *Beaufront* (Bofrôn) proponis *apartan esperantistan signon* kaj priskribis ĝin. Tiu ĉi signeto, laŭ mia opinio, estas tre bela, bongusta kaj konvena al ĉiu esperantisto. Tamen s-ro Beaufront devis prokrasti (se ne entute formeti) la plenumadon de sia projekto, ĉar por ke signeto kostu po 75 centimoj, oni devus mendi ne malpli ol 600 ekzemplerojn (Vidu "L. I." 1896, Marto).

Dum mia nuna somera vojaĝo mi konatiĝis en urbo Revelo kun esta \*) fervora esperantisto s-ro Ŝtalberg, kies profesio estas juvelado. Antaŭ mia forveturo li prezentis al mi signeton preparitan de li mem, precize laŭ priskribo de s-ro Beaufront, sed nur sen olivaj branĉetoj. (Por memoro pri nia renkonto en Revelo s-ro Ŝtalberg elgravuris daton kaj unu elvidon de urbo Revelo).

Mirita per la rapida preparo de la gracia signeto, mi demandis ĉe li, ĉu li ne povos preparadi esperantajn signetojn por ĉiuj dezirantoj kaj po kia prezo? Li respondis ke bronzaĵajn "ĵetonojn" (ĵetono = signeto por portado sur vesto) li preparos po 25 kopekoj (0,25 rublo = ĉirkaŭ 70 centimoj);

\*) "Estoj" — *Eesti* — estas malgranda popolo (parenca al finnoj) ĉirkaŭe unu miliono, sub la regno de la rusa monarĥio.

arĝentajn (pli elegantaj) po unu kaj duono da rublo (1,50 rublo = 4 frankoj). Sed transsendado estos je konto de mendanto. "Ĵetonojn" oni povas mendadi kun ringeto aŭ kun pinglo, tio ĉi ne ŝanĝas la suprenomitan prezon. Kaj jen ĉiu, kiu volos havi esperantistan signeton, povas sin turni je sekvanta adreso: *Rusujo. Vezenberg. Peterburskaja ulica, al juvelisto Ŝtalberg.*

## II.

### Unua esperanta ilustrita eldono.

Jam en la Julia N:o de "L. I." mi invitis legantojn subteni la unuan ilustritan eldonon. Nun mi povas doni pli detalajn sciigojn pri tiu ĉi eldono de nia kara sveda amiko. Nun li eldonis en sveda lingvo priskribon de sia vojaĝo (la lasta kajero eliras en Novembro). La sveda eldono enhavas 400 paĝojn kun 100 ilustracioj kaj kostas 6 kronojn 50 oerojn = 3,25 rubloj = 8,50 frankoj. Por la esperanta eldono s-ro Langlet intencas uzi ilustraciojn de la sveda eldono, kaj li povas komenci la eldonadon po 3 rubloj = 8 frankoj po ekzemplero, se oni mendas ne malpli ol 300 ekz. kaj eĉ po 1,50 rubloj (4 frankoj) se oni mendas ne malpli ol 1000 ekz.

Superflue konvinki la legantojn pri la graveco por nia afero havi unuan originalan ilustritan esperantan eldonon; pri bonaj indecoj de la libro mi ne dubas kaj kredas, ke ĉiuj persone sciantaj V. Langlet aŭ liajn belajn priskribojn (en esperanto) de apartaj epizodoj el lia vojaĝo konsentos kun mia opinio. Por personoj lin ne konantaj mi kuraĝas konsili tralegi sekvantajn artikolojn, skribitajn de li: en "Lingvo Intern." 1897:

- 1) "Ĉe Alimed-Paŝa" paĝo 82 (el Konstantinopolo).
- 2) "Ĉu mi devas plendi ke mi lernis Esperanton" p. 165 (el Varsovio).
- 3) "En Peterburgo" p. 120.
- 4) "El Odeso ĝis Konstantinopolo" p. 39... kaj aliajn.

El tiuj ĉi artikoloj oni povas vidi: kiela viva kaj freŝa observulo estas s-ro L. dum siaj vojaĝoj, kaj kiela bona rakontulo kaj sperta esperantisto estas li en siaj priskriboj. Vere, iam (kvankam malofte) en liaj artikoloj oni renkontas vortojn ne troviĝantajn en la universala vortaro, sed tio ĉi ne devas ĉagrenigi kaj kolerigi niajn severajn esperantistojn, tio ĉi estas eĉ "akiro" por nia lingvo, ĉar vojaĝante en tiom da fremdaj landoj V. L. alkitimiĝis uzi la plej universalajn radikojn, kaj li uzas ilin kun modesteco kaj ĉiam ĝustatempe.

Mi petas ĉiun, kiu ekvolus mendi unu aŭ kelkajn ekz. de "Vojaĝoj" skribi al mi, al redakcio de "L. I.", aŭ rekte al s-ro V. Langlet (Svedujo, Stokholm, Vestmannagatan 14 B), kiom da ekzempleroj li aĉetos, se la suprenomita eldono efektiviĝos.

Ĝis nun anoncis sian deziron aĉeti "Vojaĝojn" sekvantaj personoj: s-roj Ivanov 1, Ostanjeviĉ 1, Vinnickij 1, Rogaĉov 1, Ŝirjaev 5, s-inoj Proĥoroviĉ-Koĉmarenko 1 kaj Pulnickaja 3. Kune kun 10 antaŭaj = 23 ekz.

## III.

Fine mi min turnas al ĉiuj esperantistoj, al ĉiuj apartaj personoj, al ĉiuj ĵurnaloj kaj societoj, al kiuj plaĉas la ideo de reciproka alproksimiĝo de diversaj nacioj per helpo de unu internacia lingvo, kun la projekto, kiu, estonte efektivigita, gardos kaj aseknros la jam komencitan disvastigon de internacia lingvo. Unua mia provo (eĉ ne provo sed nur aludo pri mia intenco) estis tre favora: la redaktoro de L'Étranger, estimata profesoro E. Lombard, ne

sole ĝentile respondis je mia letero pri tio ĉi, sed eĉ presis ĝin en sia ĵurnalo (Oktobro 1898) kun franca traduko. Jen el kio konsistas mia projekto.

*Komencaj konsideroj:*

1) La anoj de unu lingvo internacia ne havante propran "nemoveblan proprajon" estas nur "proletario" eĉ en okazo, se multaj el ili estus riĉaj bienhavantoj aŭ animaj potenculoj: ĉar riĉulo-esperantisto havas siajn riĉaĵojn tute ne por "Esperanto", sed ankaŭ por aliaj aferoj, tiuj ĉi lastaj povos lin fari malriĉulon, povos lin igi forveturi en alia malproksima loko. Morto, malvarmumigo kaj multaj aliaj okazoj en vivo povos ĉesigi la efikecon de "animaj potenculoj". Ekzemple, kiu el malnovaj esperantistoj ne memoras, kia "paniko" (timegeco) estis inter esperantistoj, kiam s-ro Trompeter pro manko da mono ne povis daŭrigi la eldonadon de la unua kaj estinta esperantista gazeto "Esperantisto" kaj s-ro Zamenhof malgraŭ siaj varmaj deziroj kaj fervoreco ne povis savi ĝin...

2) El "L. I." oni povas scii ke multaj personoj jam uzadis "Esperanton" dum siaj vojaĝoj (pola ĵurnalisto Vasnjevskij, svedoj: V. Langlet, Etsel, rusaj inĝenieroj Kazi-Girej, Ŝmurlo, Zinovjev, instruisto Avilov, s-ino Proĥoroviĉ, germana inĝeniero Trompeter kaj aliaj). Plioftigado de tielaj vojaĝoj estas tre dezirinda kaj tre utila, ĉar unue, persona konatiĝo estas la plej forta rimedo por proksimiĝado de alilanduloj, due — ellaboriĝos kaj fortikiĝos Esperanto mem, kaj trie — la utileco de Esperanto por vojaĝistoj estas la plej bona "reklamo" por ĝi.

\* \* \*

La supre skribitaj konsideroj alkondukas al la konkludo, ke esperantistoj devas havi *siajn proprajn "hotelojn"*; antaŭe en lokoj, kie sin trovas esperantaj societoj, kluboj aŭ gazetoj (S.-Peterburgo, Upsalo, Parizo, Odeso k. t. p.) por garantii por ĉiam ilian ekzistadon. Ili estas necesaj 1) unue por ke oni povu seninterrompe kaj senĝene kolektadi kaj kunmetadi bibliotekojn, manuskriptojn (skribaĵoj per aŭtoro mano), fotografiaĵojn, portretojn k. t. p., t. e. ĉion, kio montras al ĉiu movadon kaj vivon de la bona ideo.

2) Due — permesi al lokaj esperantistoj pli ofte sin kolekti, konsideradi kaj konsiliĝi pri aferoj kaj havi la praktikon en buŝa parolado.

3) Trie — permesi al ĉiuj kun la plej poveble malgrandaj elspezoj vojaĝi en nekonataj kaj fremdaj landoj, uzante ĉie la helpon de kompreneblaj, komprenataj kaj komprenantaj amikoj.

Oni diros, povas esti, ke tio ĉi estas tre bona sed ne plenumbla revo, ĉar esperantistoj ne havas sufiĉe da mono eĉ por pligrandigi iliajn gazetojn... Sed unu fakto el vivo de mia patrujo, Rusujo, ĉiam staras antaŭ miaj okuloj: jen tie ĉi, jen tie en vasta Rusujo oni elkonstruadas "*cerkovj'n*" (tiel oni nomas en Rusujo preĝejojn). Kiu oferas por tiu ĉi celo monon? Ĉiuj kaj neniu, ĉar iu-ajn simpla vilaĝano, laŭ sia pia promeso al Dio, sin faras "kolektulo" t. e. li kolektadas dum unu, du jaroj po kvin, dek kopekoj oferataj de diversaj personoj en diversaj urboj, kaj tiamaniere kolektiĝas la necesa sumo.

Sed "*cerkovj*" kostas ordinare kelkajn dek milojn da rubloj, kaj malgranda "*esperanta hotelo*" koston tre malmulte eĉ en S.-Peterburgo, se ni nur limiĝos de la plej necesa.

*Necesaj kondiĉoj.*

I) En la domo devos esti: a) la salono por kolektiĝoj ne malpli ol 10 kvadrataj klaftoj = 50 kv.-metroj; b) biblioteko ne malpli ol 30 kv.-metroj;

c) malgranda kuirejo kun ĉambro por servanto; d) ne malpli ol unu ĉambro por alveturantoj.

II) La "Hotelo" devas "provizi" sin-mem, t. e. ke la remonto de domo kaj pago al servanto ne devos postuli novajn oferadojn, sed esti pagitaj per enspezoj de la "Hotelo".

Mi ellaboris du projektojn: unuan ligna unuetaĝa, kaj duan — ŝtona duetaĝa domo. La unua kostas (sen tera loko) laŭ peterburgaj prezoj 6,120 rublojn (17,000 frankoj) kaj la dua 13,260 rublojn (36,000 frankoj). Por ambaŭ estas necesaj ĉirkaŭe 100 kvadrataj klaftoj (500 kv.-metroj) da tero. En Peterburgo kvadrata klafto kostas ne malpli ol 30 rublojn, kaj tiamaniere oni devas ankoraŭ havi 3,000 rublojn por aĉeti teron. Por tiu ĉi celo oferas F. Postnikov 20 rublojn, Rogaĉev 5 rubl., Ostanjeviĉ 3 rubl., Proĥoroviĉ 100 rubl., Pulnickaja 10 rubl., Petrov 0,30 rubl., Miĥajlov 6 kop. Kune 138 rubloj 36 kopekoj (ĉirkaŭe 370 frankoj).

\* \* \*

P. S. Se nur oni povas presi en "L. I." la desegnon de planoj kaj de fasadoj mi sendos miajn projektojn al la redakcio kune kun detalaj kalkuloj.

Ĉiun dezirantan helpi al plej baldaŭa plenumo de la projekto mi petas sin turni laŭ mia adreso: S. Peterburg, Inĝeniernaja Akademia.

Ĉiajn promesojn, konsilojn, novajn projektojn k. t. p. mi akceptas kun granda danko.

Inter rusaj inĝenieroj mi konas multajn tre fervorajn esperantistojn, kiel ekzemple s-oj Ŝmurlo, Zinovjev, Cvetkov, profesoro Jankovskij kaj aliaj. Sendube multaj inĝenieroj estas ankaŭ inter ne-rusaj esperantistoj. Al vi, estimataj gesinjoroj, mi min turnas nun kun aparta humila peto: esprimi vian opinion pri mia propono aŭ sur la paĝoj de "L. I." aŭ rekte al mi.

Por ĉiuj invitoj de alilandaj esperantistoj — mian koran dankon! Se nur Dio permesos, mi nepre konatiĝos kun personoj tiel afable skribintaj al mi.

**F. Postnikov.**

---

## Novajoj.

### Donacoj.

Por la "Kapitalo Zamenhof" s-ro L. G. oferis 50 kopekojn; s-ro S. Fatov ankaŭ 50 kopekojn kaj s-ro S. Petrov — 2 rubl.

\* \* \*

**El Arĥangelsk** en norda Rusujo oni sciigas, ke la esperantistoj tie loĝantaj, sekvante la ekzemplon de aliaj urboj kiel Odeso kaj Smolensk, komencis jam klopodi pri la ricevo de permeso por fondi filion de la Peterburga societo "Espero"; la peton subskribis kvin membroj-fondantoj.

\* \* \*

La "Biblioteko de la lingvo internacia Esperanto" dissendis novan kaje-ron, nome "En la brikejo", originala rakonto de J. Wasniewski. La bela skizeto portas la n-ro 116 en la nomaro.

\* \* \*


En la n-ro 8—9 de *l'Espérantiste* trovas sin longa kaj bona artikolo pri *nomoj propraj en Esperanto*. Ni bezonas nur diri, ke ĝi venas de la plumo de s-ro L. de Beaufront, por ke niaj legantoj sciu pri ĝia leĝindeco. La artikolo estas verkita en franca lingvo.

\* \* \*

**Pri Esperanto parolis.** En la n-ro 198 de la rusa gazeto "*Smolenskij Vjestnik*" estis presita korespondajo de l' sekretario de la Smolenska Filio, s-ro A. Teterjev. "La Komitato de la Smolenska Filio de la societo "Espero" — skribas s-ro A. T. — decidis aranĝadi en Smolensk vicon de atingeblaj por ĉiuj literaturo-muzikaj vesperoj, je kiuj estos legataj la plej bonaj verkoj el la esperanta, rusa kaj internacia literaturo. La vesperoj estos aranĝataj en la loĝejo de la Smolenska Kredita Societo. Enirpago estos difinita tre modera, kaj libera mono iros al pligrandigo de rimedoj de la Filio. La celo — aldonas s-ro A. T. — de la similaj vesperoj estos doni eblon al la smolenskanoj agrable kaj utile pasigi la tempon kaj ankaŭ konatiĝi kun la plej bonaj verkoj de la esperanta literaturo."

— "*Arĥangelskija Gubernskija Vjedomosti*" en la n-ro 75 por la nuna jaro enhavas en la rubriko "Bibliografio" sufiĉe longan kaj tre favoran artikolon pri nia lingvo. La aŭtoro de tiu rimarko venas al la konkludo, ke al tiaj celoj, kiujn persekutas Esperanto, oni ne povas ne konsenti, kaj devas deziri la plej bonajn rezultatojn kaj sukceson. En la fino de tiu artikolo la aŭtoro rekomendas al la dezirantaj ellerni la lingvon Esperanto sin turni al d-ro Zamenhof (kaj donas lian adreson) kaj aboni la gazeton "L. I."

— La oktobra numero de "*La Plume Sténographique*" reprenis la "Opinion de la grafo Tolstoj pri Esperanto", legatan en la propagandaj broŝuretoj.



## Kiel faciligi ellernadon de nia lingvo?

Se ni eĉ tre diligente propagandos nian lingvon, sed ne penos faciligi ellernadon de ĝi, ni ne havos grandan sukceson. Nur homoj kompare pli instruitaj, pli paciencemaj kaj spertaj en ellernado de lingvoj fremdaj ellernos nian lingvon kaj fariĝos veraj, fidelaj esperantistoj. Propagandante nian lingvon, ni devas peni pri tio, ke ĉiu homo, kiun interesigos nia lingvo, ellernu ĝin kaj ne forlasu tiun ĉi lernadon ĝis fino. Nia lingvo estas ne tiom facila por ellernado, kiel ĝi povas montriĝi laŭ unua rigardo. Ĝi estas ne tute facila eĉ por homoj, iom spertaj en ellernado de lingvoj fremdaj kaj iom sciantaj kelke da lingvoj, el kiuj estas prenita la vorta materialo por nia lingvo. Mi mem devis diligente lerni nian lingvon en daŭro de kelkaj semajnoj, por libere legi internacian gazeton kaj librojn. Tamen mi ne estas tute mal-sperta en ellernado de lingvoj fremdaj, ĉar antaŭ lernado de lingvo internacia mi sciis multajn vortojn, prenitajn el diversaj lingvoj por lingvo internacia. En meza lernejo mi lernis latinan lingvon en daŭro de ses jaroj, grekan lingvon en daŭro de kvin jaroj, germanan lingvon en daŭro de du jaroj kaj francan lingvon en daŭro de kelkaj monatoj. Mi sciis multe da latinaj, grekaj, germanaj kaj francaj vortoj, prefere pli uzatajn kaj prenitajn por la lingvo internacia. Mi sciis ankaŭ, kiel pli bone komenci kaj konduki ellernadon de fremda lingvo. Kaj tamen, por ellerni la lingvon internacian, mi bezonis multe da tempo kaj sufiĉe multe da pacienco. Tio ĉi dependis ĉefe de tio, ke ni ne havas sufiĉe da libroj por komenca legado, per kiuj oni povus ellerni nian lingvon nerimarkeble kaj sen krutaj transiroj. Homoj do, kvankam kelke instruitaj, sed tute ne sciantaj fremdajn lingvojn eĉ lernado de nia lingvo estas en kondiĉoj multe pli malbonaj, ol mi estis. Ili bezonas grandan pro-

vizon da pacienco kaj sufiĉe grandan liberan tempon por ellerni nian lingvon. Tia homo trarigardas la gramatikon de nia lingvo kaj estas mirigita de ĝia mirinda facileco. Li tuj komencas lerni la lingvon internacian, sed baldaŭ konvinkiĝas, ke tiu ĉi lernado tute ne estas tiom facila, kiel li pensis. Kaj tio ĉi ne estas mirinda: malsperta lernanto devas ellerni ĉirkaŭ 1,000 vortojn kaj post tio ĉi devas rekte de l' Ekzercaro alpaŝi al legado de la internacia literaturo, skribita por homoj ne lernantaj nian lingvon, sed jam posedantaj ĝin. Tiu ĉi legado iras por la lernanto tre malfacile. En niaj libroj li renkontas ofte tre malsimplajn kaj malfacilajn esprimojn kaj krom tio li devas tre ofte rigardi la vortaron, ĉar li ofte forgesas lernitajn vortojn, kiujn li tute bone posedos nur tiam, kiam li tralegos multe en lingvo internacia. Danke al tio ĉi, multaj komencas lerni nian lingvon, sed tre malmultaj el ili kondukas la lernadon ĝis fino. Se ĉiuj homoj, komencantaj lerni nian lingvon, kondukus tiun ĉi lernadon ĝis fino, la nombro da esperantistoj estus dekoble pli granda ol nun. Kaj ĉio tio ĉi dependas nur de tio, ke ni, malnovaj esperantistoj, faris preskaŭ nenion, por faciligi ellernadon de nia lingvo por niaj novaj amikoj. Tio ĉi estas granda manko de nia literaturo, kaj ni, malnovaj esperantistoj, devas antaŭ ĉio forigi tiun ĉi mankon, se ni deziras, ke nia propaganda laboro estu tiom fruktoporta, kiom ĝi povas esti. Fruktoporteco de la propagando estas unua kaj plej grava kondiĉo de sukceso de nia afero. Ni devas fortike memori kaj neniam forgesi, ke por ni estas pli ĉefa, pli grava ol ĉio multobligi la nombron de niaj partianoj. De nombro da partianoj rekte dependas materialaj rimedoj de nia afero, kaj sen materialaj rimedoj nia afero estas birdo senflugiloj. Ni estas tre malriĉaj nur tial, ke ni estas tre malmultaj; kiam do ni estos multaj, ni estos ankaŭ riĉaj kaj en materialaj rimedoj kaj en laboraj fortoj. Kaj ju pli multaj ni estos, des pli ni estos riĉaj. Sekve multobligi kaj per tio riĉigi sin, devas esti nia ĉefa kaj plej grava zorgo. De tio ĉi ĉefe dependas nia sorto, nia estonteco: Kaj por atingi tiun ĉi celon ni devas unue: diligente propagandi nian lingvon, kaj due: eble plej multe faciligi lernadon de ĝi.

Por faciligi lernadon de nia lingvo ni havas nun unu libron "Ekzercaro". Sed tiu ĉi libro, kvankam estas bonege verkita, kvankam estas tute necesa por ellernado, estas tamen tute ne sufiĉa por fari lernadon de nia lingvo facilan kaj nerimarkeblan. Por tio ĉi ni devas havi tutan vicon da apartaj speciale verkitaj libroj kaj ankaŭ apartan instrukcion por ellernado de la lingvo, por ke nova, malsperta lernanto sciu, kiel pli bone komenci kaj konduki sian lernadon kaj por ke malgrandaj malfacilaĵoj, kiujn li renkontos en la komenco de lernado, ne timigu lin kaj ne forturnu de la lingvo internacia. Tia instrukcion por rusoj mi jam verkis, sed bedaŭrinde ne havis eblon eldoni pro manko de mono. Se tiu ĉi verkita de mi instrukcio estas ne sufiĉe bona, ni devas per komunaj fortoj eble plej bone ellabori tian instrukcion, kaj mi estus tre kontenta, se mia instrukcio estus kvankam materialo por verkado de instrukcio pli bona, pli perfekta. Al mia instrukcio estas aldonita alfabetumo por homoj, kiuj ne scias eĉ la latinan alfabeton kaj por kiuj estas ne tute facile ellerni eĉ legadon kaj skribadon en la lingvo internacia. Ellernado de la lingvo internacia devas esti komencata per la Ekzercaro. Tie lernanto trovos plej necesajn vortojn, gramatikajn regulojn kaj komencajn, plej facilajn ekzercojn en tradukado. Post la "Ekzercaro" la lernado devas esti farata per aparta libro por komenca legado. Tiu ĉi libro devas enhavi malgrandajn rakontojn, eble plej simplajn laŭ enhavo kaj esprimo. Tiu ĉi libro devas nur fortikigi tiujn sciojn,

kiujn akiris lernanto el la "Ekzercaro". Verkante tiun ĉi libron, aŭtoro devas zorgi ne pri tio, ke li donu al lernanto iajn novajn interesajn verkojn, sed pri tio, ke li donu tian materialon por legado, kia estus eble plej facila por legado, ĉar en la komenco de lernado estas plej agrable legata tio, kio estas plej facile komprenata. Mi verkis tian libron por komenca legado kaj sendis ĝin al s-ro Gernet, sed s-ro Gernet ne aprobis mian verkon. Laŭ opinio de s-ro Gernet mi malprosperis elektis la materialon por mia verko. Mia libro por komenca legado estas kunmetita el fabloj kaj malgrandaj rakontetoj, kiuj havas lokon en lernolibroj de ĉiuj nacioj kaj, sekve, estas sciataj de ĉiu iom instruita homo. S-ro Gernet pensas, ke tia libro por komenca legado estas interesa nur por infanoj, sed ne por grandaĝaj homoj kaj pro tio ĉi ne estas taŭga por komenca legado. Sed mi pensas, ke tiu ĉi opinio de s-ro Gernet ne estas prava. S-ro Gernet en tiu ĉi okazo ne diferencas ordinaran legadon kaj lernan komenca legadon. Ordinara legado en lingvo, kiun leganto tute posedas, kaj lerna komenca legado en lingvo, nova por la leganto, estas tute diversaj objektoj kaj postulas tute malegalan materialon. Kio estas plej taŭga por ordinara legado, tio ofte estas tute ne taŭga por komenca, lerna legado kaj returne. Ekzemple, laŭ mia opinio, grandaĝa homo farus tre malprudente, se li komencus ellernadi grekan lingvon per la Iliado aŭ per aliaj plej belaj kaj plej malfacilaj produktaĵoj de greka literaturo kaj lasus apartajn frazojn, fablojn kaj malgrandajn rakontetojn, ordinare lokatajn en lernolibroj, ĉar tiu ĉi materialo prezentas al leganto nenian novan ideon, nenian intereson, kaj la enhavo de tiu ĉi materialo estas jam antaŭlonge sciata al li. Ankaŭ mi pensas, ke homo, lernanta lingvon germanan, farus tre mallerte, se li komencus sian lernadon per legado de verkoj de Hejne aŭ iaj aliaj produktaĵoj de germana literaturo, plej belaj, plej enhavemaj, sed ankaŭ plej malfacile kompreneblaj por lernanto. Ni rimarkas, ke kaj grandaĝaj kaj malgrandaĝaj homoj ordinare komencas lerni lingvon per apartaj frazoj, fabloj, malgrandaj rakontetoj kaj entute elektas materialon plej simplan kaj facilan por legado. Kaj tio ĉi estas komprenebla: ili ne serĉas novajn pensojn kaj stilistikajn belaĵojn, ne serĉas interesan kaj agrablan legadon, sed ili serĉas ĉefe facilan materialon por legado. Kaj nur facila materialo povas esti interese kaj agrable legata de lernanto. Por lernanto estas gravaj ne la pensoj, estantaj en la legata materialo, sed la vorta materialo mem, la gramatikaj reguloj kaj entute la konstruo de parolo. Por lernanto estas plej grave kompreni tion, kion li legas. Agrableco kaj intereseco de legado konsistas por leganto en facileco kaj komprenebleco de legata materialo. Ĉiu homo, lernanta fremdan lingvon, estante grandaĝa, povas rememori, kun kia ĝojo kaj kontento li legis iajn fabelojn kaj malgrandajn rakontetojn, kies enhavon li konis ankoraŭ en la infaneco. Kaj tiu ĉi cirkonstanco, ke lernanto konas la enhavon de tio, kion li legas, tute ne malhelpas lian lernadon, sed, kontraŭe, tre multe helpas. Ĉiu, per sia propra sperto, scias, ke unu konata vorto de fremdlingva frazo iaforte malkovras al lernanto la sencon de tuta frazo, se la lernanto scias, pri kio li legas. Tial, kiam lernanto ellernos la gramatikon kaj kelkajn vortojn de la lingvo internacia, li tute libere tralegos en tiu ĉi lingvo malgrandajn verketojn, kies enhavon li konas. Li per la komuna enhavo de verketo kaj per la helpo de vortoj jam konataj al li tre facile divenos la signifon de nekonataj vortoj, kvankam la nekonataj vortoj estus pli multaj, ol la konataj. Kaj ju pli konata estos al leganto la enhavo de verko, des pli facile li ĝin tralegos. Tial mi opinias, ke por lerna komenca legado en ĉiu lingvo povas esti nur sola bona

materialo: fabloj kaj plej simplaj malgrandaj rakontetoj, kaj ju pli tiuj ĉi verkoj estos konataj laŭ enhavo por leganto, des pli bone estas\*). Mi, sekve, restas ĉe mia antaŭa opinio, ke mi elektis plej bonan materialon por verki libron por la komenca legado, kaj ni, ĉiuj literature laborantaj esperantistoj devas nun per komunaj fortoj doni al tiu ĉi materialo bonan, eble plej simplan kaj tute internacian formon, kiel mi jam diris antaŭe. (L. I. 1896, N:o 10—11\*\*).

Post la libro por komenca legado lernanto devas havi alian libron por lerna legado. Tiu ĉi dua libro por lerna legado devas jam esti tute alia. En la dua libro sur unua loko devas stari noveco kaj intereseco de enhavo. Unua libro devas logi homon per la mirinda facileco de la lingvo internacia por ellernado, kaj la dua libro devas logi homon per sia malordinara enhavomeco kaj riĉeco de pensoj. Por verki tiun ĉi duan libron, mi proponas al ĉiuj amikoj esperantistoj kolektadi anekdotojn de ĉiuj landoj kaj tempoj kaj sendadi la kolektitan materialon al unu elektita persono-redaktoro. La redaktoro kaj liaj helpantoj kolektas la sendatan materialon, elektas el ĝi ĉion plej bonan kaj tiel kunmetas libron da anekdotoj, la duan libron por lerna legado. Tiu ĉi libro devas esti tre zorgeme traredaktita per multaj diversnaciaj homoj, por ke ĝia stilo estu eble plej bona kaj internacia. Mi pensas, ke tiel ni povus kolekti plej bonajn anekdotojn el ĉiuj plej ĉefaj literaturoj kaj verki tian interesan libron, ke leganto ne povus lasi ĝin antaŭ ol tralegus ĝis fino.

Jen, kiel ni devas zorgi pri tio, ke faciligi ellernadon de nia lingvo por ĉiu, kiu komencas lerni ĝin, se ni volas, ke homoj, komencantaj lerni nian lingvon, konduku sian lernadon ĝis fino. Sen tio ĉi, nia propaganda laboro perdiĝas kaj ne atingas celon. Ni propagandas al homo nian lingvon, kaj kiam li komencos lerni ĝin, ni lasas tiun ĉi homon por volo de sorto. Ni kalkulas tiun ĉi homon en nombro da esperantistoj, sed tiu ĉi homo ordinare nur komencas la lernadon de la lingvo internacia kaj poste lasas ĝin por ĉiam. Tiel ni per unu mano konstruas kaj per la dua — detruas. Mi pensas eĉ, ke por nia afero estas pli grave faciligi la ellernadon de la lingvo, ol propagandi ĝin. Ni devas memori, ke se homo komencis lerni nian lingvon, sed ne kondukis la lernadon ĝis fino, ni perdis nian amikon-esperantiston kaj perdis nur pro tio, ke ni ne sufiĉe zorgis por faciligi al li la ellernadon. Mi pensas, ke se ni havus necesajn lernolibrojn, la nombro de niaj amikoj estus multe pli granda.

Tial, por nia afero estas tute necesaj la sekvantaj lernolibroj:

- 1) Instrukcio por ellerni la lingvon internacian.
- 2) Alfabetumo de la lingvo internacia.
- 3) Libro por komenca legado (kolektaĵo da fabloj kaj malgrandaj rakontetoj; daŭrigo de la "Ekzercaro").
- 4) Libro da anekdotoj (dua libro por komenca legado).

La unua libro instruas lernanton pri rimedoj de ellernado; la dua — forigas malfacilaĵojn, kiujn lernanto povas renkonti en skribado kaj legado en

\*) S-ro Zamenhof en Ekzercaro lokis la fabelon "Feino". Tio ĉi donas al mi rajton supozi, ke s-ro Z. tiel ankaŭ, kiel mi, opinias pri la materialo por libro de komenca legado.

\*\*\*) En nia literaturo estas la verko de I. Lojko "50 fabloj de Ezopo", sed tiu ĉi verko, kvankam ĝi estas bona akiro por nia literaturo, ne povas plenumi la rolon de libro por komenca legado, ĉar tiu ĉi verko estas nur traduko, sed ne speciale verkita por la komenca legado. La tradukanto de tiu ĉi verko zorgis ne tiom pri la simpleco de stilo kaj komprenebleco, kiom pri beleco kaj traduka precizeco.



la lingvo internacia; per la Ekzercaro lernanto praktike ellernas la gramatikon kaj la plej ĉefan parton de la internacia vortaro; per la tria libro li fortikigas siajn sciojn; la kvara libro enkondukas lernanton en la literaturon de nia lingvo\*). Tia vojo de ellernado estus tre facila. Homo ellernus nian lingvon sen ĉia signifa embaraso kaj preskaŭ nerimarkeble. Traleginte la suprediritajn librojn, li jam povus libere legi nian gazeton kaj fariĝus ĝia abonanto kaj, sekve, vera, fidela esperantisto\*\*).

Karaj amikoj! Ne prokrastu prijuĝi kaj solvi tiun ĉi demandon, kiun mi nun prezentas al vi. Tiu ĉi demando estas unu el la plej gravaj demandoj de nia afero, kiujn ni devas solvi. Mi eĉ pensas, ke tiu ĉi demando estas pli grava, ol ĉiuj aliaj, kaj de la solvado de tiu ĉi demando ĉefe dependas la tuta sorto de nia afero.

Orŝa, Rusujo. Aprilo 1898.

M. S. Rakitski.

*Rimarko de la Redakcio.* Kiam s-ro Rakitski diras ke "nia lingvo ne estas tiom facila, kiel ĝi povas montriĝi laŭ unua rigardo", li opinias, kompreneble, ke, kvankam Esperanto estas multoble pli facila ol ĉia ebla nacia lingvo, tamen ĝia ellernado povus fariĝi pli facila, se iaj certaj kondiĉoj estus plenumotaj. Sendube ni bezonas verkon, en kiu estas instruoj pri la reguloj de la *logika sintakso*. Kun tia normo ni povus aranĝi lernilojn pri la sintakso de Esperanto por la naciaj lingvoj, tiuj ĉi lerniloj estus do komparo inter la strangejoj de la nacia lingvo kaj la logika esprimo de Esperanto. Ni bezonas plenan gramatikon esperantan en Esperanto.

## La Ĉevalkovrilo.

(El *Langbein*.)

La kristnasktago eklumetis;  
Nordvento fajfas tra l' arbar'  
Kaj neĝ-ŝarĝitajn pinojn ĵetis;  
Arbajon flugas for l' aglar'.

En ĉambr' dezerta tremas, ploras  
Jen maljunulo tie ĉi.  
Arĝente muroj blank-koloras,  
Kiel\*\*\*) barb' lia, pro glaci'.

La frost' en ĉambron de l' kastelo  
De Balduin' lin pelis for.  
De l' mebloj kaj kameno bela  
Fajreras ĉie l' or-kolor'.

Spegul' pro l' fajr' flugile svingas  
En la kristalo de l' kamer',  
Kaj dolĉodoro ĉirkaŭringas  
L' agrablan varmon de l' aer'.

La maljunulo seĝon ŝovas  
Al rand' marmora de l' kamen',  
Kie rigidaj manoj povas  
Seniĝi de la frostkaten'.

De l' blov' de flamo ĵus tuŝite,  
Li en teruro levis sin,  
Ĉar venis ĉambron nun subite  
Kun kri' fil' lia, Balduin'.

"Foriru! ĉu vi ne memoras,  
Ke kastelmastro estas mi?  
Min ĉarme viv-ĝardeno floras;  
En ĝi nur dorno estas vi!

"Foriĝu de kastel' ĉi tiu!  
Hieraŭ tia estis vort'  
Ordonu mia; se ne — sciu —,  
Mi vin elpelos tuj per fort'".

\*) Estus tre bone havi ankoraŭ unu libron por lerna legado: libron da aforismoj. Pri tiu ĉi libro mi iam diros detale. Tiu ĉi lasta libro (la tria libro por komenca legado) devas esti daŭrigo de la libro da anekdotoj.

\*\*\*) Veraj, fidelaj esperantistoj povas esti nomataj nur la memstaraj abonantoj de nia gazeto.

\*\*\*\*) Tia malkorekta akcentado, ofte ripetita en tiu ĉi versaĵo, estas peko, kiun devas tute eviti niaj versistoj.

*Rimarkoj de l' aŭtoro.*

*Rimarko de la red.*

“Ho! kien mi min turnu? Dio!  
Vi ne malvirtu tiel, hom’!  
Ĉu tiel nuda kun nenio  
Foriru mi de l’ patra dom’?”

“Mi vin mastrigis la palacon,  
Al vi fordonis ĉion ĉi;  
Al mi malriĉa donu spacon,  
Sur kiu morti povos mi.”

“For, for! sed ne ĉi tie resti!  
Riproĉ’ min hardos kiel fer’;  
Vi povus, sen bedaŭro, esti  
Jam longe verma manĝ’ en ter’

“Jam hom’ kun aĝo okdekjara  
Al tomb’ matura estas! Sed  
Ne estus ĝi antikva faro,  
Al ĝu’ ne venus ja hered’!”

“Ho, fil’ memoru ke Savanto  
Naskiĝis tagon ĉi! Pro Li,  
Je virt’, bonfaro, ĝojeganto,  
Vi ne obstinu tiel ĉi!”

“Al vi rakontos la memoro,  
Ke la donacojn tagon ĉi  
Al vi mi donis kun favoro;  
Kaj panon min rifuzas vi!”

Sed pli obstina li fariĝis,  
Ju pli kortuŝis patro lin;  
Bruegis li, malkvietiĝis,  
Kiel pro l’ vent’ ĉirkaŭe l’ pin’.

Sur lin eĉ manon la barbaro  
Kun furiozo de leon’  
Ŝurmetis, kaj per griza haro  
Ĝis pord’ lin trenis la fripon’.

“Ho ve! kompatu! Mi foriras,  
Evitas jam en estontec’  
La pardon vian; sed deziras  
Malgrandan signon de homec’.

“Vi vidas ja ĉi frakon mian,  
Kaj aŭdas bruon de la vent’:  
Al mi donacu veston ian,  
Nun kontraŭ frost’ al mi defend’.”

“Renkontu vin la ĉi bonfaro!”  
Parolis li, turnante sin  
Al sia filo la dekjara,  
Veninta nun por aŭdi ĝin:

“Georg’! venigu vi el stalo  
Pendantan tie en angul’  
Kovrilon novan de ĉevalo,  
Kaj donu ĝin al maljunul’.”

Knab’ iris, venis. “Kial”, filon  
Hero’ demandas,“ daŭris vi?  
Ha! kion vidas mi? kovrilon  
Kiu dividis tiun ĉi?”

“Mi!” diris knab’ al li trankvile,  
“Lin kovri ja sufiĉas ĝi;  
La reston do, al ĉi simile,  
Konservis mi, patret’, por vi!”

Grizul’ rifuzis mute l’ donon,  
Kun ĝem’ rigardis al ĉiel’,  
Konsole metis vag-bastonon  
En neĝon, vagas for sen cel’.

Pordegon ŝlosis maestr’ sen zorgo,  
Ridante vortojn de la fil’; —  
Post tridek jaroj per Georgo  
Li ankaŭ estis en ekzil’.

Mozes Goldberg.

## Du blinduloj.

*Sceno el la lando de Donaĵ kozakoj*

de

**Valdemar Langlet.**

Io okazis, pri tio ĉi oni ne povis dubi. Sed *kio* — tio estis pli ol iu povis diri.

Ni nur vidis, ke homoj rapide kuradis trans la platformo de l’ malgranda fervoja stacio sur la Dona stepo en kozaka lando, kie ni estadis — lanternoj estis svingitaj en nervuma malpacienca, kaj la vagonaro restis sur la reloj, kvankam devus antaŭ longe foriri. La malfeliĉo? . . .

La fervoja inĝeniero, la distancoestro, kaj lia kolego de la proksima distanco, kiu ankaŭ estas en nia societo, ekŝanĝas signifajn rigardojn, kaj Avanov, la princo, kiu ĵus agordis sian mandolinon por elludi mazurketon, lin oni sendas por esplori la situacion. Avanov entute neniam diras *ne*, kiam

oni lin petas pri io, kaj kompreneble tial oni lin uzas por ĉio ebla. Dume oni ne povas diri, vere, ke li estas pli konfidinda ol aliaj — jes oni eĉ pli alproksimiĝas al la vero dirante ke *malpli*, kaj ekzistas iu aŭ alia, kiu ankaŭ ofendiĝas je li, parolante ke li preskaŭ neniam diras unu veran vorton kaj malofte plenumas sian promeson. Sed ne rigardante tiun malgrandan mankon li do estas sufiĉe bona por la societo, ĉar malgraŭ siaj kvindek jarjaroj kaj grizaj haroj li estas “gaja knabo” kaj plena je friponaĵoj kaj ridindaĵoj.

Li, sekve, estis sendata la kelkajn paŝojn ĝis la stacidomo por ekscii, kio do estis. Sed antaŭ ol li eĉ alvenis, okaziĝis io, kio unue envolvis la situacion, sed poste helpigis ĝian klarigadon. Ni ĉiuj ekaŭdis subite unu krion aŭ, pli ĝuste, unu malklaran, sed penetrantan akran kriegon, tiel tranĉante teruran, ke ŝajnis al ni kvazaŭ tuta mondo da doloro estus en ĝi enŝlosita. Ni aliaj ne komprenis ĝian signifon, sed Anna Fedorovna, la mastro, videble tuj per ia nekomprenebla instinkto eksciigis pri la situacio: ŝi rapide ekkrietis: “Ho, mi komprenas”, kaj kun signifa ekrigardo al ni ŝi forkuris el la balkono, kie ni sidis, en la domon.

Avanov tuj revenis kaj tre grave informigis, ke ia homo estis falinta sub la radojn de l’ vagonaro — sed, laŭ kutimo, neniu aparte ekvolis kredi al li, tiom plu ĉar la vagonaro, kiel ni sciis, jam staris senmova dum dudek minutoj. Tial ni ĉiuj foriris por ekscii pri la afero, kaj jam ni staris sur la platformo, kiam la sama teruriganta kriego estis denove ripetata, sed tiu ĉi fojo sekvita de alia, pli homa kaj pli natura krio — la ploretado de ĵusnaskita infano!

Ni alproksimiĝis al unu kupeo de kvara klaso, el kiu venis la sono, kaj ekrigardis tra la fenestro. Sur la planko tie interne, en la haladzo-plena atmosfero, kuŝis virino, laŭ elvido, pli morta ol viva, vestita en ordinara vesto de rusa vilaĝanino kun sia ruĝa sarafano, kun kap-tuko kaj bastaj ŝuoj. Super ŝin kliniĝis alia virino, tenante en siaj manoj malgrandan korpeton, apenaŭ pli granda ol paro da fortaj man-pugnoj, kiun ŝi ĵus suprenigis en la mizeran lumon de l’ vagona lumilo — estis malgranda hom-estaĵo kun kvar ekstremitetoj, kiuj baraktis en la aero, kaj kun pulmoj, egale bonaj kiel ĉe ĉiu ajn alia de ĝia aĝo. La pentraĵo vere estis kortuŝanta.

Feliĉe la stacio apartenas al tiuj, en kiuj la fervoja societo subtenas malgrandan malsanulejon kun kuracilejo. Tien nun estis translokita la sceno de l’ agado. Du kozakoj portis la duone senkonscian virinon, alia prenis ŝian apartenaĵon, kaj la nova malgranda mondano estis portata de la bona akuŝistino, kiu per feliĉa okazo alestis.

Ni sidiĝis sur ia benko apude. Iu iris eksenti la pezon de l’ bagaĝo, kiun oni metis apud la pordo, kaj esprimis sian miregon, ke virino en tiaj cirkonstancoj povis kun si porti tielan pakadon. Avanov kompreneble tuj ekdiris, ke estus al li malpli komprenebla, se la virino ne naskus infanon — eĉ ne-graveda do povus naski sub tiela portaĵo! — Avanov ŝercis kaj ĝojiĝis ŝercante, kaj ŝajne pro tia kaŭzo li forgesis diri, ke la virino ankoraŭ, krom tio, havis tri malgrandajn infanojn kun si, inter kiuj la plej malgrandan ŝi devis porti sur siaj brakoj!

Dume sin prezentis malfacila demando; la infanon oni devis do tuj bapti, laŭ rusa kutimo, kaj por tio ĉi oni bezonis, interalie, unu “popon” kaj du baptojn. Tiujn ĉi lastajn oni facile trovis: Anna Fedorovna, kiu dumtempe alvenis kun mistera amaso da blanka ŝtofo, alportita el ŝia hejmo, kaj kun ŝi Sergej Aleksandroviĉ, la kolego de ŝia edzo. Pli malfacile oni trovis

popon, sed tamen fine oni ekprosperis eltrovi unu tielan, kiu ronkis en la vestiblo. Li estis, kun iom da malfacileco, vekita, jesigis je la propono plenumi la akton kaj formariĝis en sia longa kaftano kun flirtantaj larĝaj brakigoj kaj pendaĵoj.

Sed li tuj revenis tre ofendita kaj klarigis malkontente, ke kiam ne estis nek libroj nek oleo kaj "ornato", tiam li ne povis nek volis altuŝi la aferon — estis honto nur eĉ proponi ion tielan! Iu kontraŭdiris, ke la infano tamen en ĉia okazo *devis* esti baptita, kaj ke oni ja devis peni trovi ian eblecon. La popo nur skuis la kapon, tiel ke la longa haro ondiĝis, kaj levis la ŝultrojn kun mieno, kiu pli klare ol vortoj ekdiris: tre povas esti, sed al *mi* tio tute ne koncernas!

Tio ĉi cetere estis sufiĉe vera, ĉar li tute ne estis devanta fari bapton tiel ĉi *à propos* kaj ekster sia komunumo, kaj li do povis, per la kostumo kaj elvido de l' virino, supozi ke tie ĉi li ne povus esperi ian pli vastan rekompencon por la "klopodo". En tio ĉi lasta li tamen iom eraris, sed — tion ĉi oni ne povis scii antaŭe. Kaj ĉar la popoloj en Rusujo ordinare ne havas konstantan salajron, sed dependas por sia ĉiutaga pano de la donacoj de l' publiko por la servado, komencis tre nature ĉe ili la kutimo rigardisian servadon kiel tute metian okupadon, kiun oni plenumas kun volonto respondanta al la grandeco de l' atendita rekompenco.

Kelkan horon poste tamen prosperis al unu el la memvolaj baptoj, al kiuj tiu afero plej proksime apartenis, venigi el ne malproksima preĝejo la necesajn objektojn, kaj la popo estis denove alvokita.

Nun nur restis la decido pri la nomo, kaj ĉio estus preta. Ĉar en Rusujo nur estas permesita doni al infanoj tiujn nomojn, kiujn portis la sanktuloj — kaj sanktulinoj — oni ordinare ne longtempe serĉas. Aŭ oni prenas la nomon de la patro aŭ, pli bone, de la avo, aŭ la nomon, kiun tiu tago portas en la almanako. Ĉar tie ĉi la unua ebleco forestis, — neniu do konis eĉ la patron kaj ankoraŭ malpli la avon — kaj la dua ebleco ankaŭ prezentis malfacilaĵojn, ĉar oni en la rapideco ne povis trovi la almanakon, proponis Avanov, la princo, tre bonvole ke li mem, kiel sian kontingenton en la armado de l' malgrandulo kontraŭ la malbonaĵoj de l' mondo, donu sian nomon, Dmitrij — kiun malŝparan proponon ĝentile sed decide reĵetis la baptopatro, kiu opiniis ke lia propra nomo, Sergej, estis por tiu celo egale uzebla. Ĉar neniu riskis kontraŭdiri tion ĉi, oni rigardis la aferon kiel deciditan, kaj kiam la etulo en la sama momento estis alportita, komencis tuj la akton.

En la malgranda malsanulejo oni aranĝis sufiĉe bone laŭ la cirkonstancoj. En mezo sur la planko staris provizora baptingo; ĉirkaŭ la supera rando de ĝi estis alpremitaj kelkaj kandeloj, longaj graciaj, brulantaj. La popo apude staris, vestita en arĝent-kudrita, sendube kaj ĉifona kaj malpura, sed en la malforta lumado tamen sufiĉe "prezentebla" kaftano. Sergej Aleksandroviĉ tenis la infaneton, kaj Anna Fedorovna estis preta akcepti ĝin post la akto. La patrino kuŝis, vestita, sur la apuda lito, kun la malgracia, pala vizaĝo kontraŭ la lumo. Mi rigardegis ĝin, sed tiom kiom mi povis vidi, estis rimarkebla en ĝi preskaŭ nenia alia esprimo ol tiu de indiferenteco malinteresita — la sceno estis sendube por ŝi malpli nova kaj malpli interesa ol por mi. Kiel atestaĵo de tio ĉi povis ankaŭ esti kalkulitaj la malgranduloj, kiuj timantaj sidis en ia anguleto. Cetere estis en la ĉambro neniu, krom la akuŝistino kiu enverŝis akvon en la baptingo, unu maljuna duon- aŭ plenblinda maljunulo, kiu reprezentis la ĥoron, kaj mi, kiu venis pro pura scivoleco.

La popo komencis legi, legi per tiu trenanta duon-kantanta tono, kiun mi tiel bone rekonis el la rusaj preĝejoj; estis nur la diferenco, ke tie oni ordinare ne *tiel* rapidiĝas, dume tie ĉi ŝajnis plej grave: en plej mallonga tempo trakuri eble plej grandan parton de l' *ritus*. Iam kaj iam la blinda maljunulo agordis kun sia disrompita voĉo, kriegante iajn *responsoria* (respondaĵojn), kiujn la popo neniam volis aŭdi ĝis fino. Li prenis de Sergej Aleksandroviĉ la infanon, tenis ĝin per siaj manoj, nudan kaj plendetantan kiel ĝi estis, kaj "orde" dronigis ĝin per la sanktigita akvo, kies sanktecon ankoraŭ grandigis la kandeloj brulantaj. Kiam la malgrandulaĵo ree estis levita el la akvo, denove komencis la maljunulo kun sia disrompita voĉo kelkajn mizerajn kantaĵojn, el kiuj mi nur povis kompreni la ĉiam ripetitajn vortojn: *Hospodi pomiluj — Hospodi pomiluj —* Sinjoro, kompatu! Dio, pardonu!

Kia pentraĵo! La malgranda, seka, blinda maljunulo, kiu kun tremantaj manoj serĉante rampis laŭlonge la muro por ke li venu iom pli proksime, prezentis per sia sulka kvazaŭ velkigita vizaĝo la figuron de homo kiu staras apud la rando de l' tombo. Kaj, aliflanke, tiu ĉi malgranda estaĵo, kiu ĵus eniris sur la saman rigardejon de suferoj kaj pasioj, kiun la alia estis preta forlasi — ankaŭ li, la malgrandulo, blinda, tremanta, malforta kaj sulka kiel malnova vintra pomo — kia similo kaj kia kontrasto!

*Hospodi pomiluj, Hospodi pomiluj* denove kantis la maljunulo. Sinjoro kompatu tielan malgrandulan infanon de l' mizero! En peko kaj manko ci naskiĝis, kaj kiel tie ĉi en nuna momento ne ekzistas eĉ unu sola koro, kiu batas varme por ci kaj cia mizero, ne eĉ la patrina koro, — tiel ci ankaŭ en la vivo renkontos plej ofte nur batojn kaj puŝojn, nur ĉagrenojn kaj dolorojn, kaj, povas esti, ci iros en la tombon ne malpli mizerega ol la maljunulo, kiu kantis ĉe cia bapto. — Sinjoro, kompatu! Jes, povas esti, ci foriros el la mondo, malgrandulo, antaŭ ol ci lernis kio ĝi estas, la mondo, antaŭ ol ci gustis ĉiujn la puŝojn kaj hakojn, atendantaj cin de ĉiuj, kiuj estas pli supraj ol ci aŭ egalaj kun ci — pli *malsupre* neniu estos, kaj de ĉarmo kaj dolĉeco de l' vivo ci neniam ĝuos...

*Hospodi pomiluj!* Kaj la malgrandulon envolvis kompate Anna Fedorovna en la tukoj kaj vindaĵoj, kiujn ŝi kudris por sia propra infano, sed kiujn ŝi kun larmoj formetis, kiam ili nur dum tri semajnoj servis al malgranda, rompema estaĵo, tro malforta por ke ĝi toleru la malvarman spiron de l' morto. Ekzistis sekve almenaŭ *unu*, kiu varme sentis por la malgranda! Ho, ne — nur estis la memoro de propraj ĉagrenoj, kiuj por minuto moligis homan koron!...

La pastro faris la krucosignon super la baptita kaj tenis al la baptoj krucifikson, por ke ili ĝin kisu. Ili faris tion kun proksimume la sama atento, kun kia oni ĉe ni en Svedujo legas la "manĝopreĝon".


Nun restis nur du aferoj, sed tiom pli gravaj. La ateston de bapto oni devis skribi, kaj la popo devis ricevi la salajron por sia peno. Ne, pardonu, ne en tiu ordo — la *plej* grava unue, kaj poste la alia! Sekve nur kiam la popo kun granda plezuro metis en la poŝon la bileton de 3 rubloj, kiun donis al li Sergej Aleksandroviĉ — lia baptonaco al la malgrandulo — nur tiam la popo sidiĝis apud la table por ke li donu skriban ateston, ke la malgranda sulka pakaĵo, kiun tenis en siaj brakoj Anna Fedorovna, nun estis orde farita membro de la sankta ortodoksa eklezio. La atesto de bapto — dokumento sufiĉe grava en Rusujo kiel alie — estis skribata per kraĵono sur la malantaŭa flanko de ia eks-telegramblanketo. Kiam Sergej

Aleksandroviĉ proponis al la popolo uzi inkon kaj plumon, tiu nur rimarkis: "pli rapide iras en tiu ĉi maniero".

"Pli rapide tiel ĉi" — tio estis la ĉefa enhavo de l' pensoj de l' popolo, kiel ĝi sendube ankaŭ estas la parolo de la tuta rusa pastraro.

Kaj kun tiu ĉi impresio mi forlasis la unuan kaj lastan akton de baptado, kiun mi ĝis nun vidis en la greka-katolika eklezio.

Apud la pordo staris la maljuna blindulo. Li ricevis dudek kopekojn kaj preĝis Dion, ke Li benu min kaj la infanojn de miaj infanoj. La malgranda blindulo ricevis nenion; kredeble li unu fojon malbenos la homojn.



## Unujaro.

Novelo tradukita el pola lingvo de A. Zakrĵevski.

En la dormejo, lumigita per la lumo de malgranda lampo, sidis juna virino. Tra la larmoj, kiuj brilis en ŝiaj okuloj, ŝi atente rigardis la disĵetitajn sur la tablo malgrandaĵojn. Tiujn ĉi malgrandaĵojn faris la rompitaĵaj infanaj ludiloj, simplaj arbaj ludiloj, kiajn oni ordinare donadas al la malgrandaj infanoj, kaj peco de mallarĝa blua rubandeto. Tiuj ĉi objektoj estis la memoraĵoj de ŝia mortinta filo; ĉiu el tiuj ĉi objektetoj memorigas al ŝi ian feliĉan aŭ malĝojan momenton el lia vivo...

Ŝi vidas la belan rideton, kiu brilis sur lia buŝo, kiam li ludis kun tiuj ĉi ludiloj, jen ree la palan kaj malsaneman vizaĝon, deturnantan sin de la amataj por li antaŭe ludiloj. Poste rememoras ŝi tiun malĝojan momenton, kiam ŝi deprenis el liaj malvarmigaj kaj mortaj manoj tiun ĉi bluan rubandeton, kaj ankoraŭ pli ŝi ploras...

Hodiaŭ estas unujaro de la morto de ŝia infaneto; en la daŭro de tiu ĉi jaro, ĉiuj, kiuj amadis lin, nun jam forgesis lin, nur la memoro kaj la amo de la patrino estas tiel fidela, ke ne estingiĝas, nur se kune kun ŝia vivo.

Unu fojon, vizitante la tombon de ŝia mortinta filo, tralegis ŝi sur unu el la tomboj la subskribon: "Dio donis, Dio prenis; sankta estu Lia volo." Tiuj ĉi vortoj paroladis pri la profunda kredo kaj pri la trankvila animo de tiuj, kiuj elektis al si tiun ĉi devizon.

Ho! kiel ŝi envias al tiu trankvileco de l' animo. Kial do ŝia ne povas ripeti tiujn ĉi vortojn?!... Kaj hodiaŭ ŝi pensadis kun malĝojo pri tio, ke la sorto permesas vivi al miloj da infanoj, ne amataj, kaj al ŝi la sorto prenis la unu karan infaneton, kvankam ŝi lin tre amadis kaj gardadis. Tiuj pensoj la centan fojon aperadas en ŝia kapo, plenigante ĉiujn anguletojn de ŝia cerbo kaj elvokante ĉiam tiajn samajn pentraĵojn. Sed fine tiuj ĉi pentraĵoj paliĝas, fariĝas malklaraj, senformaj kaj la sento de la efektiveco komencas ŝanĝi en ia fantazia revo.

Ŝia filo ne mortis, li vivas; kaj iom post iom al ŝi prezentiĝas la tuta lia vivo. La vivo estas multepeza, plena da diversaj zorgoj, malfeliĉoj, maldolĉaĵoj, kaj malforta kaj malsanema organismo de la knabo malfaciligas al li tiun bataladon.

Kiam li lernis en la lernejo, la scienco turmentadis lin kaj konsumadis; li estis ĉiam malĝoja, kiam liaj egalaĝuloj ĝoje pasadis la plej feliĉajn jarojn de sia vivo.

Malĝoje fariĝis al la patrino, kaj la zorgo pri la estonta sorto de ŝia filo komencadis maltrankviligi ŝian animon.

El la knabo fariĝas viro, honesta kaj plena de ambicio; liaj revoj atingadas malproksime. La patrino fieriĝas je sia filo, sed la zorgo pri lia feliĉo pli ofte kaj pli ofte ne donadas al ŝi la trankvilecon. Ĉar la vivo jam instruis ŝin tiun veron, ke ju pli iu ekamas, des pli li devas koni la malprosperojn kaj la malensorĉojn; ju pli li esperas, des malpli atingos en la vivo. La timoj de la patrino plenumiĝas; la ambicioj do kaj la revoj de la junulo fluidiĝas, kiel la glacio, lia koro restas nekomprenita per tiuj kiujn li ekamis, miloj da malhelpaĵoj depaŝas lin el la elektita de li vojo.

Nun li estas homo malfeliĉa!

Lia patrino ne revas jam pri la feliĉo al li, sed deziras nur vidi lin eĉ trankvilan kaj paĉigitan kun sia sorto.

La tempo tamen pasas, alportante al li nenian feliĉon, kontraŭe alportante al lia malfeliĉa vivo ankaŭ novajn maldolĉaĵojn kaj malprosperojn.

— Kie do estas tiu feliĉo, por kia mi vin edukadis? ekparolas la malfeliĉa patrino kaj la malĝojo plenigas ŝian koron.


Pasadis la jaroj; ie do malproksime sur la hospitala lito mortas la malfeliĉa revisto.

Neniu el la apudestintoj povas kompreni la mutan plendon, kiu ŝajne estas vidata sur la buŝo de la mortanta. La patrino fleksis la genuojn, kaj kun la larmoj en siaj okuloj ŝi preĝis tiel, kiel iam en la simila terura momento; nur tiam ŝi petegis por li la vivon, kaj hodiaŭ la feliĉan morton kaj la liberigon de lia multepeza vivo.

— Ho! kial vi ne mortis, estante infano? ekmurmuretis kun malfacileco ŝiaj lipoj.

La eĥo de ŝia propra murmureto vekis ŝin. Post tiu ĉi terura sonĝo, la reveniĝo al la efektiveco montriĝis al ŝi io bona.

Ekrigardis ŝi la disĵetitajn sur la tablo memoraĵojn kaj la unuan fojon post la morto de sia filo ŝi ripetis la vortojn: "Dio donis, Dio prenis, estu sankta Lia volo." Kaj ŝian animon kaj koron plenigis la trankvileco.



## De niaj abonantoj.


*Letero al la redakcio.*

Mi komencis eldonadi en la rusa lingvo alilandan antologion, tio estas: kolekton de versaj tradukoj de poetoj de tuta mondo. Mi petas esperantistojn, kiuj volas helpi al mi, komuniki al mi siajn adresojn. Helpo devas esti tia: 1) Komuniki al mi la registron de plej bonaj poetoj de sia lando, aparte de plej novaj (scioj pri antaŭaj poetoj estas en historioj de literaturoj); 2) Komuniki mallongajn notojn pri nuntempaj poetoj; 3) Alsendi al mi prozajn tradukojn en la lingvo esperanta de plej bonaj versoj de poetoj, kiuj ne estas tradukitaj en la rusa lingvo (prefere de plej novaj), kun unua strofo de versoj en la lingvo originala por difino de formo kaj mezuro de verso. Mi eldonis jam (sub nomo N. Novič) sekvantajn volumetojn de ontologio: 1) Ĥinujo kaj Japanujo en ilia poezio; 2) Maĝaraj (hungaraj) poetoj; 3) Poetoj de Finnlando kaj Estlando. Estas preskaŭ pretaj por preso: Svedaj poetoj (mankas kelkaj plej novaj poetoj: Verner von Heidenstam, P. Hallström kaj ceteraj). En plej proksima estonto mi intencas eldoni poetojn de judoj kaj araboj, de Francujo kaj Provenco, de Danujo kaj Norvegujo, de slavaj landoj, kaj ceteraj.

Kun plena estimo

**Nikolaj Baĥtin.**

27 Sept. 1898. Russie, Orel, Kadetski korpus.



### Informejo de Esperantistoj.

**Korespondadi** kun esperantistoj kaj esperantistinoj de ĉiuj landoj deziras s-ro *E. D. Isajev* en *V. Baliklej*, gub. de Astrahan, Rusujo;  
 S-ro *Wincenty Dulko*, leŭtenanto de la infanteria regimento, strato Bogoslovskaja, domo N:o 4, *Smolensk*, Rusujo;  
 S-ro *Aleksandro Zakrjevski* (polo) — kun alilandaj esperantistoj, precipe sinjorinoj kaj fraŭlinoj — Troickij prospekt, domo de Ananjin, *Arĥangelsk*, Rusujo.  
 S-ro Fil. kand. *Fredr. Mellander* en *Karlskrona*, Svedujo.  
 Korespondadi kun stenografistoj-esperantistoj de ĉiuj landoj deziras *J. Ĵivotovski*, Russie, *Odessa*, Maly per. 1.  
 Kun esperantistoj kaj esperantistinoj de ĉiuj landoj deziras korespondadi s-ro *Nikolaj Ĉulkov*, Rusujo, *Arĥangelsk*, Troickij prospekt, dom Gartman.

#### Agentoj de la lingvo Esperanto:

- 29. S-ro *Krasnokojin* en urbo *Bjelyj* (gub. de Smolensk). Rusujo.
- 30. S-ro Fil. kand. *Mauritz Sterner* en *Tomarp*, Svedujo.

**Al atento de la rusaj esperantistoj.**

Nova, perfekta, simpligita, tre facile ellernata metodo de Rusa Stenografio de J. A. Ĵivotovski en kvin leteraj lecionoj. La kondiĉojn kaj prospekton oni elsendas senpage.

Odessa, Maly per. N:o 1.  
Al J. A. Ĵivotovski.

Per Esperanto. Danke al Esperanto.

Speciala instruado de

## Librotenado

kaj komercaj kalkuloj

per korespondado en lingvoj: rusa kaj hebrea. La rekompenco estas tre modera. Prospektojn kaj provajn leterojn mi sendas al ĉiu, kiu sciigas min pri sia adreso.

Mia adreso estas:  
*Julius Levik*, Berdiĉev (Rusujo).

## L'Espérantiste

monata gazeto  
publikigata en la franca kaj esperanta lingvoj

havas la celon propagandi Esperanton en la landoj uzantaj la lingvon francan kaj entute apud ĉiuj komprenantaj tiun ĉi lingvon. Per tekstoj kaj konsiloj specialaj, ĝi potence helpadas al la adeptoj pri la perfekta akiro de Esperanto.

Por ricevi *L'Espérantiste* oni povas: aŭ simple aboni ĝin (3 fr. en Francujo; 3 fr. 50 en la aliaj landoj) — aŭ fariĝi membro de la Societo por la propagando de Esperanto (4 fr. por jara enpago).

*Sin turni al S-ro René Lemaire, sekretario de la societo, en Epernay (Marne), Francujo.*

### L'Étranger, Organe de la société eliradas ĉiumonate per granda n:o, kiu ĉiam enhavas tekston esperantan kun franca traduko. Kostas en tuta mondo 8 frankojn ĉiujare. Abonanto de tiu ĉi gazeto ankaŭ havas la rajton fariĝi membro de la societo "Correspondance Internationale" (I. C.), kiu kalkulas ĝis nun ĉirkaŭe 300 membrojn.

Adreso: **L'Étranger: 77 rue Denfert-Rochereau, Paris.**

### Enhavo de tiu ĉi numero.

|   | paĝo |   | paĝo |
|---|------|---|------|
| <i>Tri proponoj de S. Postnikov</i> . . . . .   | 145  | <i>Unujaro. Novelo</i> tradukita el pola lingvo de <i>A. Zakrjevski</i> . . . . . | 158  |
| <i>Novaĵoj</i> . . . . .  | 148  | <i>De niaj abonantoj (Nikolaj Baĥtin)</i> . . . . .                               | 159  |
| <i>Kiel faciligi ellernadon de pia lingvo?</i> de <i>M. S. Rakitski</i> . . . . .             | 149  | <i>Informejo</i> . . . . .  | 160  |
| <i>La Ĉevalkovrilo</i> de <i>Mozes Goldberg</i> . . . . .                                     | 153  | <i>Anoncoj</i> . . . . .  | 160  |
| <i>Du blinduloj. Sceno</i> el la lando de Donaj kozakoj, de <i>Valdemar Langlet</i> . . . . . | 154  |   |      |